

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando

Esperantobladet

Joulukuu ♦ Decembro

6/1999

*Bonan
Kristnaskan
sezonon*

kaj

*Feliĉan novan
jaron 2000!*

**Esperantoliiton
talvipäivät
Rovaniemellä.
Ilmoittaudu
heti! s. 16**

**Esperanto
sen mitoj, p. 6**

Hejma vortaro, p. 8



Esperantolehti

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen aikakauslehti. Suomen esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.

Språkpolitisk tidskrift. Organ för Finlands Esperantoförbund.

Lingvopolitika periodaĵo. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.

Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.

Esperanta Finnlando 1918-23, 1948-53, 1959-1987.

Ilmestyy kuusi kertaa vuodessa. Utkommer sex gånger i året. Aperas sesfoje jare.

Toimitus/Redaktion/Redaktejo: *Aimo Rantanen*

PL 2, 40801 Vaajakoski. ☎ (014) 261 438 ✉ esperantolehti@esperanto.fi

Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Ilkka Santtila*

Tollinpolku 1 B 21, 00410 Helsinki. ☎ (09) 530 1804 ✉ ilkka.santtila@esperanto.fi

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 80 mk/vuosi/år/jaro;

Jäsenille/ För medlemmar/ Por membroj: 60 mk; Baltio 60 mk, aliaj landoj 80 mk.

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adresŝanĝoj:

Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. ☎ (09) 715 538

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.

Postisiirtotili/Postgirokonto/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Julkaisija/utgivare/eldonanto: Suomen Esperantoliitto – Esperanto-Asocio de Finnlando.

Painosmäärä/Eldonkvanto: 400

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja: *Jukka Laaksonen*

Uudenkylänkuja 2 B 11, 33530 Tampere. ☎ (03) 255 4724; (050) 5829 248; työ/laboro: (03) 249 4313

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja: *Jukka Pietiläinen*

Nyyrikintie 4 H 47, 33540 Tampere. ☎ (03) 261 7871 ✉ jukka.pietilainen@esperanto.fi

Sekretario/Sihtööri: *Päivi Saarinen*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet:

Anna-Liisa Ali-Simola, Friskinkatu 2 A 33, 20360 Turku. ☎ (02) 238 7767

Kimmo Hakala, 72300 Vesanto. ☎ (017) 648 831 ✉ khakalat@nettilinja.fi

Seija Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, 40630 Jyväskylä. ☎ (014) 254 609

Anna Ritamäki, Dragsfjärdsvägen 690, 25700 Kimito. ☎ (02) 423 146 ☎ (02) 423 246 ✉ aritamak@ra.abo.fi

Vicestraranoj/Varajäsenet:

Jussi Jäntti, Huuhankatu 14 B 8, 70600 Kuopio. ☎ (0400) 859 641

Markku Saastamoinen, Siukolantie 9 H 12, 33470 Ylöjärvi. ☎ (03) 348 4245

Ritva Sabelli, Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 635 902 ✉ ritva.sabelli@sfs.fi

Rahastonhoitaja/Kasisto: *Antti Mikkola*

Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ antti.mikkola@orion.fi

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800017-230825.

Toimisto/Officejo: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17-19.

☎ (09) 715 538 (puh.vastaaaja/automata respondilo). Malfermita: marde 17-19-a horo.

UEA:n pääedustaja / Ĉefdelegito de UEA: *Heta Kesälä*

Kalamiehenkuja 3 D 32, 04300 Tuusula. ☎ (09) 275 5528

Postisiirtotili/Poŝtĝirkonto: 800029-19438647 (maksut UEA:lle/ pagoj por UEA).

Internet: <http://www.esperanto.fi>

Bilanco por la 1900-aj jaroj

Evidente multaj skribantoj volas dum nunaj tagoj rigardi malantaŭen al la pasintaj cent jaroj (se ne eĉ al mil jaroj) kaj estas malfacile eviti fari la saman. Fari tion koncerne Esperanton estas iom neprudente, ĉar la lingvo vivis nur dum 113 jaroj. Ĉiuokaze la finiĝantaj 1900-aj jaroj signifis multajn diversajn aferojn en Esperanto-movado. Okazis du grandaj militoj kaj regis diktaturoj, kiuj preskaŭ aŭ tute detruis la movadon en pluraj landoj kaj pereigis milojn da senkulpaj esperantistoj inter aliaj homaj viktimoj. Okazis ankaŭ tempoj de granda entuziasmo kaj evoluo.

Sur la sojlo de la 2000-aj jaroj la movado estas kaj forta kaj malforta – depende de lando al lando. Estas landoj, kie la movado forte kreskas kaj kie ĝi ricevas novajn freŝajn fortojn. Aliflanke estas landoj, kie la movado stagnas povante nur pene aŭ tute ne renoviĝi.

La movado vivas laŭ la cirkonstancoj, kiujn difinas ĝenerala politiko, moraj inklinoj kaj pritaksado de diversaj flankoj de vivo. Ĉar esperantismo – se oni rajtas nomi ĝin ismo – baziĝas sur homaranaj principoj, ĝi bone fartas en mondo, kie oni strebas al pli justa konsidero de ĉies opinioj kaj bezonoj. Male la movado malfacile vivas en premo de diktaturo aŭ senkontrola regado de tn. komercaj fortoj.

Lingvo ne estas absoluta valoro, ĉar sen uzantoj ĝi ne povas vivi nek havi kulturon. Multe do dependas de tio, kiel la lingvo estas akceptata. Dum la finiĝantaj 1900-aj jaroj okazis pluraj ŝanĝoj en la tutmonda lingva situacio. Plurfoje ili ne estis agrablaj, ĉar formortis multaj lingvoj kaj kelkaj aliaj ricevis fortan pozicion nur pere de armiloj. En pluraj landoj okazis popolaj (kaj tiel ankaŭ lingvaj) persekutoj kaj eĉ genocidoj. En la mondo forta ĉiam ŝajnas havi la rajton malgraŭ tio, ke oni fondas tutmondajn organizojn por protekti malfortajn kontraŭ fortaj.

Ĉu Esperanto havos signifon en la komencanta jarcento/jarmilo? Evidente nur, se ni esperantistoj sukcesos konvinkigi per iu aŭ alia maniero sufiĉan nombron de homoj pri ĝia taŭgeco. Bedaŭrinde tio, ke la lingvo vivis 113 jarojn, ne povas garantii ion ajn. Ankaŭ ni mem ne povas decidi pri la estonteco de la lingvo. La iniciatinto, d-ro Zamenhof, pravis jam antaŭ cent jaroj: nur la mondo povas prijuĝi kaj nia tasko estas nur oferti al la mondo nian alternativon. Aktivado aŭ pasivado en la ofertado estas en niaj manoj.

Al ĉiuj legantoj de Esperantolehti mi deziras kiel eble plej bonan komencantan jaron kaj jarcenton.

Jukka Laaksonen

Kion novan en finna E-movado?

Informada seminario en Jyväskylä 13.-14.11.1999

En Jyväskylä kolektiĝis 13 respondeculoj pri informado de EAF kaj lokaj E-kluboj por ideigi novajn manierojn en varbado por Esperanto. La etoso de seminario estis labor-ema sed ankaŭ hejmeca, eble pro tio ke ni seminariis en la Kristana popolaltlernejo en urboparto Kuokkala. La ideoj trovitaj por plibonigi Esperanto-informadon ne estas dramatike novaj, speciale laŭ opinio de malnovaj esperantistoj, kiuj sekvis la evoluon de nia landa movado jam jardekojn. Sed nia movado bezonas nun retrovodon de malnovaj ideoj, ekzemple organizado de landa E-libroservo, ĉar tio necesas pro malfunkcio de ĝisnuna aranĝo.

Tute nova estis pensmaniero koncerne la celgrupo de farota E-broŝuro de EAF. Nun ni celas trovi 20- ĝis 40-jarajn personojn ne kiel ĝis nun per informa sed ekde nun sur imagoj bazita varbkampanjo. Informa broŝuro rakontus la historion de Esperanto ekde Zamenhof, sur imagoj bazita broŝuro estas multkolora kaj interese enpaĝigita varbilo al precize celita grupo. Ni ne uzu nur la tedan verdan koloron kaj stelon, sed faru broŝuron kun grandaj fotoj kaj minimuma tekstamaso kun sloganoj, emblemo kaj aliaj tipo-

grafiaj elementoj allogaj. La nova broŝuro estas nur unu parto de varbpako, kiu enhavas novajn informajn prospektojn por plie interesitoj, aliaj estas vizitkartoj kun emblemo prenita el la unua broŝuro, leterpaperoj kaj kovertoj kun kampanja emblemo. Prefere oni uzu la emblemon, ne la stelon, kaj prefere en aliaj farboj ol la tradicie verda.

Estos fonditaj du grupoj por informado de EAF. La unua estas reaga grupo kiu publikigus oficialan, novaĵforman opinion en amaskomunikiloj pri aferoj koncernajn EAF. Subskribanto de la opinio estas Esperanto-Asocio de Finnlando. La dua estas informadgrupo, kiu informas kaj lokan kaj ĝeneralan publikon pri E-aranĝoj de EAF. Tiu grupo evoluas informadrutinojn inter EAF kaj lokaj E-kluboj. Rezulte de la seminari-diskutoj, Esperantolehti ekpublikigas limkaj aperdatoj de numeroj venontaj. Nova en Esperantolehti estas kontaktkarto por abonantoj.

Mi deziras al ĉiu leganto bonan Kristnaskan sezonon kaj sukcesan E-aktivadon en nova jarmilo.

Aimo Rantanen

Kokouskutsu

Esperanto-Asocio de Finnlando – Suomen esperantoliitto r.y.:n sääntömääräinen vuosikokous pidetään sunnuntaina maaliskuun 19. päivänä 2000 alkaen klo 10.00 hotelli Oppipojassa Rovaniemellä. Kokouksessa käsitellään liiton säännöissä määrättyt asiat.

Jäsenyhdistysten edustajien valtakirjojen tarkastus tapahtuu kokouspaikalla samana päivänä alkaen klo 09.30.

*Esperanto-Asocio de Finnlando
– Suomen esperantoliitto r.y.*

Hallitus

Caisa sin prezentas

La festivalejo por la venontsomera Kultura Esperanto Festivalo (suomeksi: Esperantofestaro) estas la kulturcentro Caisa en Helsinko. Pli videble en la helsinka urbocentro apenaŭ eblas – la stacidomo ja ne lueblas. Caisa estas tre vigla kulturcentro, bone konata al ĉiu helsinkano.

Surprize la nomo Caisa ne devenas de la ĉirkaŭanta urboparto Kaisaniemi, sed de vortoj Casa International (domo internacia). La internacia domo fondiĝis en 1995 kaj la vizitanto rapide kreskis. Ĉi jare Caisa havas pli ol 100 000 vizitantojn, t.e. proksimume 400 personoj tage uzas la servojn aŭ la kulturen oferton de Caisa. Duono de la vizitantoj estas enmigrintoj, la alia duono finnoj.

36 personoj el 14 diversaj landoj laboras por Caisa. Caisa-anoj entute parolas 30 lingvojn. La ĉiutaga laborlingvo estas tamen la finna. Esperanton ankoraŭ neniu el la personaro scipovas.

Caisa celas esti ponto inter enmigrintoj kaj helsinkanoj kaj apogi harmonian plenkulturiĝon de Helsinko. Grava tasko estas ankaŭ peri informojn pri diversaj kulturoj kaj pri la finna socio al enmigrintoj. Caisa aktive kulaboras kun lernejoj, oficejoj, asocioj, institutoj, universitatoj ktp.

La programa oferto estas tre riĉa, kaj por infanoj kaj por plenkreskuloj. Oni povas partopreni japanan taseremonion, konversacian rondon de la samea aŭ elementan kurson pri la mongola (La malpli ekzotikajn lingvokursojn mi eĉ ne mencias), lerni senegalan dancon "Mbalax", sekvi prelegon pri Nepalo, spekti latinamerikajn filmojn aŭ ĝui multkulturen feston. (Oni rajtas senhonte partopreni eĉ sen bonaj scioj pri la samea aŭ fluaj paŝoj en "Mbalax"). Ankaŭ la koncerta kaj ekspozicia oferto abundas. La foiro "Caisan messut" estas jam tre kontata okazaĵo kaj estus, cetere, bona forumo ankaŭ por esperantaj asocioj. Kadre de Caisa funkcias ankaŭ la kafejo "Cafe Exotic".

Por la jaro 2000 Caisa antaŭvidas i.a. "Caisas Comedy Club" (Komediklubo de Caisa), forumon por ŝercoj kaj internacia amuziĝo kaj internacian kongreson de poetoj. Kaj la Kulturen Esperanto Festivalon! Laŭ personaro de Caisa, Esperanto estas preskaŭ la sola kion ili ankoraŭ ne havis en la programo. Kun entuziasmo ili nin akceptis.

Por pliaj informoj konatiĝu kun la retpaĝoj de Caisa: <http://www.kulttuuri.hel.fi/caisa/>

Alvoko al kunveno

Laŭstatuta jarkunveno de Esperanto-Asocio de Finnlando okazos dimanĉon, la 19-an de marto ekde la 10-a horo en hotelo Oppipoi-ka en Rovaniemi. En la kunveno estos pri-traktataj aferoj difinitaj en la asocia statuto.

Kontrolado de rajtigiloj por membrasocietaj reprezentantoj okazos en la kunvena loko samtage ekde la 09.30-a horo.

La estraro

Kio restas post mitoj?

Ziko Marcus Sikosek: Esperanto sen mitoj. Mensogoj kaj memtrompoj en la Esperanto-informado.

La libro, kiu subtitole defias malkovri mensogojn kaj memtrompojn en la Esperanto-informado, kaptas atenton. Eĉ pli kiam la leganto komencas legi la libron. Ziko Sikosek, kunlaboranto de informa fako de Germana Esperanto-Junularo, senindulge atakas diversajn mitojn, sur kiuj la Esperanto-informado ofte baziĝis. La libro aperis pli frue en formo de du kajeroj, sed nun la materialo estas plene prilaborita kaj reordigita.

La analizo de Sikosek estas dividita en sep partojn: informado, komunumo, subtenantoj, lingvo, planlingvoj, Zamenhof kaj manifestoj. En ĉiu parto Sikosek malkovras la mitojn kaj memtrompojn. La facileco de Esperanto montriĝas ofte dependi pri propra iniciato, entuziasmo kaj aktiveco en ekzercado dum la aliajn lingvojn oni lernas devige kaj havas malmultan ŝanĉon praktiki. Esperanto ne estas logika, nek ideala lingvo por tradukado.

Sikosek dubas ankaŭ eĉ modestajn taksojn pri la parolantoj de Esperanto: “tre, tre optimisme oni (...) povus taksi la esperantlingvanaron je ne pli ol 40 000 tutmonde. Sed se post altnivela internacia enketo montriĝus ke tutglobe nur kelkaj mil homoj flue parolas Esperanton, mi ne surpriziĝus.”

Uzado de Esperanto por internaciaj amikecoj ne estas rezulto de iu “interna ideo“

aŭ sekvo de asocia politiko, sed inverse: homoj lernis Esperanton ĉar ili jam antaŭe deziris internaciecon kaj uzas Esperanton kiel taŭgan instrumenton por tio, kaj “nomante sian lingvon “lingvo de paco, de racia kaj justa komunikado ktp.” esperantistoj sin mem filaŭdas“ ĉar “eble Esperanto estas “lingvo de amikeco“ nur ĉar komerca uzado grandparte mankas?”

Ĉu io restas sen atento de Sikosek? La politikaj aspektoj de Esperanto-movado eble estas unu el malmulte tuŝataj temoj. Ili estas prezentitaj iom flanke kaj ĉe “komunumo sen mitoj“ kaj ĉe “lingvo sen mitoj“, sed eble propra ĉapitro “movado sen mitoj“ estus povinta aldoni ion. Ekzemple en la libro ne troviĝas io pri tio, ĉu ne Esperanto, same facile kiel la nunaj vaste uzataj lingvoj, ne povus esti danĝera por aliaj lingvoj, se ĝi estus uzata same vaste.

La politikajn celojn de la movado Sikosek traktas ankaŭ en sia, laŭ mi parte mistrafa, kritiko de la Praga manifesto. Ekzemple, eventuale al Sikosek, kiel parolanto de unu el la grandaj lingvoj de Eŭropo, ne estas problemo dubi la opinion ke “ĉiu lingvo estas valora pro si mem kaj inda je protaktado kaj subtenado“ (sesa punkto de Praga manifesto). Por parolanto de malgranda lingo tia dubo eventuale ne aperus same facile.

Tamen la kritiko de Sikosek montras, ke kvankam la Praga manifesto estis paŝo antaŭen (Sikosek opinias la malon), la evoluo de pensado (almenaŭ se juĝi laŭ Sikosek)

estis pli rapida ol dum jardekoj. La Praga manifesto ja enhavas malmulton novan, sed nur diras pli klare kaj pli rekte tion, kion Esperanto-movado jam pli frue opiniis, sed pro diversaj kialoj malofte kuraĝis diri.

La aŭtoro estas juna kaj relative nova esperantisto, sed lia argumentado estas profunda kaj la fakta bazo senerara. Se kompari la libron kun iu tradicia gvidilo pri esperanta informado, ekzemple “Esperanto sen antaŭjuĝoj,” la libro estas grandega paŝo antaŭen, eĉ kvankam ĝi malmulton diras pri tio kiel informi kaj kion diri, kaj atentigas nur pri tio, kiun ne necesus diri. Eble Sikosek aŭ iu el liaj sekvantoj iam verkos daŭrigon “Esperanto kun faktoj”. La libro estas ankaŭ verkita en flua, relative facila lingvaĵo, ofte la libro legeblas same facile kaj kun simila atendo pri la sekvo kiel legante detektivan romanon.

En la fino Sikosek malkovras kiel li venis al ideo batali kontraŭ mitoj kaj memtrompoj: komence en 1994 li kredis, ke la ĉefa defio estas informi kaj li kritikis ĉefe la stilon de la informado, poste li ekkomprenis, ke la problemo estas ke oni devas rekonsideri la tutan ideologion sur kiu la tradicia informado estas bazita kaj fine en 1996 li ekdubis pri la Esperanto-movado entute. Ĉu

io restas post la forlaso de mitoj kaj memtrompoj? Sikosek ne donas rektan respondon al tio, sed eventuale la respondo estas jesa: kvankam multo el la mitoj sur kiuj la tradicia Esperanto-ideologio baziĝis (kaj pro tio mem elvokis eksteran kritikon pri nesukceso), Esperanto estas unu el la pluraj eblecoj al internaciaj kontaktoj kaj al pli egal-eca lingva komunikado.

Mi grandparte konsentas kun la kritikoj de Sikosek pri la esperanta informado. Fakte, la informado kiu baziĝis al mitoj kaj memtrompoj, kontraŭagis la celojn de la informado kaj senutile instigis kritikojn de tiuj kiuj ne same facilanime akceptis la fanfanaĵojn de esperantistoj. La libro estas utila por ĉiuj, kiuj informas pri Esperanto, sed ankaŭ al ĉiu esperantisto, kiu volas lerni pri sia esperantisteco kaj kritike analizi ĝin.

Ĉu Esperanto-movado sukcesos travivi sen memtrompoj? Sikosek ne donas respondon al tiu demando, kiun li prezentas en la fino de la libro. Tamen, lia respondo verŝajne estas pozitiva: eblas, sed eble tiu movado aspektus iomete alia, eble ĝi allogus aliajn personojn.

Jukka Pietiläinen

Korespondi deziras

Mi volus korespondi kun samideanoj veladantaj tra la maro aŭ oceano. Laŭ profesio mi estas instruisto pri eduka sporto kaj kaptano de velado. Mia adreso: Wieslaw Michalak, ul. Wallenroda 7/43, 20-607 Lublin, Poland.

Brazilano, loĝas en Usono, komencanto, deziras korespondi kun alilandanoj. Johano Ludoviko, *Esperanto2@aol.com*

Franca esperantistino, progresanto, deziras korespondi pri ĉiuj temoj. Adreso: s-ino Kristina Taret, 44 rue du Mingoval, 59235 Bersee, Francio.

Aperis hejma vortaro

HEJMA VORTARO. Vortareto de hejmaĵoj en Esperanto. Red. Jouko Lindstedt. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1999. 63p. ISBN 92 9017 065 4. 21cm. Prezo: EUR 7,50.

Parolantoj de Esperanto, kiuj uzas la lingvon hejme kiel ĉiutagan komunikilon, ofte sperdas ke ordinaraĵaj vortaroj ne ĉiam utilas por trovi nomon por iu enhejma aĵo aŭ ago. Hejma Vortaro celas helpi al ili. Ĝi proponas Esperantajn nomojn por diversaj ĉiutagaj aferoj.

En Hejma Vortaro la Esperantaj kapvortoj estas rekoneblaj per Esperantlingva difino, kiun sekvas traduko en 13 naciaj lingvoj. La lingvoj estas, kun interkrampe la respektiva respondeculo: la angla (Brian Moon), la finna (Jouko Lindstedt), la franca (Suzan-

ne Bolduc), la germana (Rudolf Fischer), la hebrea (Amri Wandel), la hispana (Jorge Camacho), la hungara (Sandor Hideg), la itala (Mauro La Torre), la japana (Nagata Hiroshi), la nederlanda (Jorg De Mulder), la portugala (Cicero Soares), la rusa (Aleksandro Ŝlyfer) kaj la sveda (Martin Strid). La ĉefredaktoro de la vortaro estas prof. Jouko Lindstedt el Finnlando.

Hejma Vortaro rezultas el multjara preparado fare de la kunlaborantoj de Rondo Familia de UEA, ĉefe pere de la komputilreta diskutejo DENASK-L. Ĝi estis iniciatita jam komence de la 80aj jaroj de Anna Löwenstein kaj Renato Corsetti. Provizora papera versio aperis en 1997. Ankaŭ la nuna eldono ne pretendas esti definitiva kaj kompleta, sed ĝi estas malferma por plua plibonigo kaj pliriĉigo.

Esperantlingva jubileo

Lingva arto. Jubilea libro omaĝe al 75-a datreveno de William Auld kaj Marjorie Boulton. Red. Vilmos Benczik. UEA. Rotterdam 1999. ISBN 92 9017 0646.

Eĉ la nomo de la libro por jubileo de du elstaraj E-poetoj multnuancas. En Finnlando oni distingas literaturon per vorto *vortarto* el aliaj artbranĉoj, ekzemple dancarto kaj bildarto. Tio speciale en artinstruado. Ĉu esperantista verkisto verkas lingv- aŭ vortarton? Mi esperas ke ambaŭ. Ĉu oni povas kombini vortarton al iu speciala lingvo? Tiam oni forgesas tiajn verkistojn kiel Elias Canetti kaj Joseph Conrad kiuj ne verkis en ilia gepatra. Ĉio eblas en artmondo. Ofte

malsupereblaj barikadoj ekzistas nur en kapo teoriaj distingistoj.

La jubilea libro omaĝe William Auld kaj Marjorie Boulton konsistas el eseoj kaj artikoloj de 24 eminentaj esperantistoj. La verkaĵoj montras ke io nova estas okazanta en nia movado. Eble generacia ŝanĝo, eble tuta novdirektiĝo de niaj pensmanieroj. Veraj trezoroj en la jubilea libro estas la eseo de Sergio Pokrovskij pri "La majstro kaj Margarita" de Mihail Bulgakov, la eseo de Abel Montagut pri la temo malfacileco de lingvoj, la komentoj de Manuel Seabra al Infana raso de William Auld kaj la eseo de Paul Gubbins pri "Berlino en romanoj de Varankin kaj Schwartz". La jubilea libro omaĝe al Auld kaj Boulton estas esperantlingva jubileo kaj stila. AR

Muzika momento por trankvilo

Música per a dues gitarres. Albéniz-Granados-Sor-Lawes-Vivaldi-Myers. Duo Ràfols-Rodríguez. Enregistrita 20-21 aŭgusto 1998 en la preĝejo Sta Maria de Barbera del Vallès. ARS HARMONICA 1998. La tekstkajeron esperantigis Anja Karkiainen.

La kompakta disko (KD) de la Duo Ràfols-Rodríguez enhavas komponaĵojn por du gitaroj ekde la epoko baroka ĝis la jaro 1933. La komponaĵoj malstreĉigas la animon de ilia aŭskultanto kaj ili havas longdaŭran efikon post la aŭskultado, same kiel la ĉi-somera koncerto de la duo diversloke en Finnlando.

La plej malnova komponaĵo sur la KD estas la Suito por du liutoj de William Lawes (1602-1645). La gitaroj de la duo Ràfols-

Rodríguez eĉ sonis kiel du liutoj! Vivaldi multaj laciĝintaj personoj uzas por meditado kaj malstreĉiĝo. Tial eble la "Jarsezonoj" estas plej konata barokkomponaĵo tra la tuta mondo kaj ankaŭ furoraĵo ĉie. El la verkoj de Antonio Vivaldi la duo ludas la Koncerton en D maĵora (1730).

La hispana komponisto Isaac Albéniz (1860-1909), la katalunoj Enric Granados (1867-1916) kaj Ferran Sor (1778-1839) la Duo Ràfols-Rodríguez ludas per humilo. Ĝuste tiu parto de hispanaj kaj katalunaj komponaĵoj estas la plej interesa sur la KD. Ekzemple Ferran Sor neniam aŭdiĝas en Ylen Ykkönen, la kanalo por klasika muziko ĉe la Finna Radiofonio.

AR



La duo Ràfols-Rodríguez koncertis i.a. en Jyväskylä.

La neĝviro

Joukko lappeenrantalaisia esperanton jatkoryhmäläisiä käänsi esperantoksi samalla paikkakunnalla asuvan nuorten ja myös aikuisten kirjailijan Pauli Matikaisen kertomuksen.

La neĝo fariĝis humida, kaj Repa kaj mi komencis ruli neĝbulojn kun Jasu. Repa ekpensis, ke ni faru grandan neĝviron ĉe la vojrandoj.

Por trunko ni rulis tiel grandan bulon, ke ni devis puŝi ĝin triope, por ke ĝi eĉ estu movaĝinta. La meztrunkon ni faris el tri pli malgrandaj neĝbuloj kunigante ilin per neĝo. Ni faris la kapon terure granda. Sur la vojo ni trovis kelkajn ŝtonetojn por okuloj kaj buŝo. Ni metis dikan ligneron kiel nazon.

La neĝviro estis vere impona. La alteco estis almenaŭ du metroj kaj la suba parto unu metron larĝa.

– Oni povus tien enrampi, se ĝi estus kava, diris Jasu, kiam ni rigardis la neĝviron sur la vojo.

– Ho jes, krietis Repa.

– Ni kavigu ĝin dorsflanke kaj revenu vespere fantomi enkaŝonte nin. Laŭ ni la plano estis bonega, kaj ni tuj iris hejmen por preni laborilojn. Repa promesis kunporti la fosilon, per kiu ni fosis vojeton en la korto de Toikka. Jasu promesis kunporti ĉerpilon, per kiu oni fandas stanon dum novjarnokto. Laŭ Jasu ĝi estis bonega por fosi kavetojn. Mi devis porti iun trancilon por modifi la membrojn de la neĝulo. Ni interkonsentis reveni je la sesa vespere.

Mi memoris hejme, ke en nia subtegmento troviĝis malnova ĉapelo, kiun neniu plu uzis. Mi petis ĝin de mia patrino, kaj ŝi tuj promesis. Kiam mi supren grimpis, mi tie vidis malnovan blankan ĉemizon de mia patro kaj mi decidis peti ankaŭ ĝin.

– Por kio vi ĝin bezonas? demandis unue patrino, sed kiam mi diris, ke ĝi estus bona neĝvesto dum la kaŝludo, ŝi ridis kaj promesis doni ĝin. Mia koro ekĝojis: la knaboj ekmiros!

Mi iris al la neĝulo iom antaŭ la sesa. La knaboj ne estis venintaj. Mi ĉapeligis la neĝulon kaj mi mem surmetis la blankan ĉemizon. Poste mi faris fosaĵon por piedoj proksime al la neĝulo por kaŝi ilin. Mi kuŝiĝis sur la neĝo.

– Rigardu, ĝi havas ĉapelon, diris Repa al Jasu, kiam la knaboj finfine alvenis la neĝulon.

– Kiu ja ĝin portis? demandis Jasu kaj ĉirkaŭenrigardis. Tiam mi ĵetis neĝbulon al la kapo de la neĝulo kaj ĵetiĝis en la neĝon.

– Kio ĝi estis? ektremis Jasu, sed Repa tuj diris tute trankvile, ke certe ĝi estis Ana. Tiam li kriis: ”Elvenu subite! Ni ja scias, ke tie estas vi.”

Tiam mi eksaltis kaj kriegis. Ankaŭ Repa ektimis nun, ĉar li ne povis atendi, ke mi estis tiel proksime.

– Ho, ĝi estas grandiosa! li diris. – Tute kiel la neĝvesto de soldatoj. Al mi plaĉis, ke la knaboj laŭdis mian neĝveston, kaj mi pensis, ke estis genie kunporti ĝin. Sed tiam ni komencis kavigi la neĝulon.

Kiam la kavaĵo estis suface granda, ke oni povis tien enrampi, ni trapikis inter butonoj etan truon, tra kiu oni povis observi la vojon.

Repa restis en la interno de la neĝulo, kaj mi iris kun Jasu sur la vojon por rigardi. Nian trueton oni ne povis distingi de aliaj butontruoj, kaj sonis fantome, kiam Repa kriadis en la neĝulo. Subite ni vidis, ke sur la vojo proksimiĝis du homoj. Jasu kaj mi tuj eksaltis malantaŭ la amasigitan neĝon kaj mansvingis al Repa, ke iu venas.

Kiam la homoj alproksimiĝis, ni rimarkis, ke ili estis Eikka kaj Päikkä. Ili estas knabinoj de nia klaso, kaj ĉiuj knaboj ŝatas ilin. Precipe Päikkä, ĉar ŝi bone sportas. La knabinoj iris laŭ la vojo kaj babilis kiel knabinoj kutimas, kaj kiam ili estis ĉe la neĝulo, kriis Repa:

– Bonan vesperon! Kien iras fraŭlinoj?

La knabinoj ekhaltis. Ili ĉirkaŭenrigardis, sed ili vidis nur neĝulon, kiu diris: – Ĉu mi povas akompani vin, ĉar ĉi tie estas tro solece? Tiam la knabinoj furioze ekkuris al la vilaĝo.

– Atendu, atendu, atendu! kriis la neĝulo al la knabinoj, sed ili plu pli rapide forkuris. Kiam la knabinoj ne plu estis videblaj, ni revenis de malantaŭ de neĝamasoj kaj ekridegis.

– He, ni foŝu truon en ĝian flankon, tra ĝi oni povas elpuŝi la brakon, mi proponis. – Tiu ĉi ĉemizo tiel similas al neĝo, ke ĝin oni ne povas distingi el neĝo. Kiam iu en la neĝulo mansvingos, ŝajnos ke la neĝulo



estas tiu kiu mansvingas.

– Jes, la knaboj tuj entusiasmiĝis, kaj ni forbatis la dekstran manon de la neĝulo. En tiu loko ni foŝis truon. Mi rampis en la neĝulon kaj etendis mian manon eksteren, kaj la knaboj iris al la vojo por rigardi. – Oni ne povas ĝin distingi el neĝo! la knaboj kriis, kaj mi suprenlevis mian manon. ĝi tuŝis la ĉapelrandon kaj mi levis la ĉapelon kriante: Vesperon, knaboj! La knaboj ridis kaj tuj kriis, ke iu alvenas!

La knaboj saltis malantaŭ la neĝamason por rigardi, kaj tra la gvatotruo mi klopodis vidi la vojon. Tiu kiu venis estis avino de Mähönen. Ŝi estas agrabla avino, kaj ŝi neniam kriaĉas al infanoj kaj tial mi decidis, ke mi ne ŝin timigu. Sed antaŭ ol la avino de Mähönen estis ĉe la neĝulo, laŭ la vojo ankaŭ venis ĉevalo tirante sledon. Sendube jen estis Eikka, kaj agaciĝis mia koro. Nun kredus la knaboj, ke mi ne kuraĝos mansvingi.

Ĵus kiam la avino de Mähönen estis ĉe la neĝulo, ankaŭ Eikka venis tien kaj malrapid-

igis la ĉevalon. Eikka levis la ĉapelon kaj kriis: – Vesperon! Kaj tiam ankaŭ mi tute instinkte levis la ĉapelon de la neĝulo kaj laŭte kriis: ”Vesperon, vesperon!” Mi remetis la ĉapelon.

– Kio! Eikka kriegis kaj terure ekstremis. Ankaŭ la ĉevalo ektimis kaj arde trotis antaŭen. Post iom da vojo ĝi ekfekis kaj Eikka kriis ptruu, sed ne helpis. Ankaŭ la avino de Mähönen ekkuris laŭ la vojo kiel kapablis. – Ho ĉielo, ŝi irante kriis kaj premis sian bruston. Ankaŭ ŝi malaperis malantaŭ la kurbicon.

La knaboj aperis de malantaŭ la neĝamaso kaj ridis kurbiĝante. Kiam ni denove estis trankvilaj, flustris Jasu: – La ĉevalo! Tuj ni ĉiuj estis surventre malantaŭ la neĝamaso kaj observis la vojon.

Estis Eikka kiu de tie revenis kun la galopanta ĉevalo, kaj la sledglitiloj fajreris. Ĉe la neĝulo Eikka tiris la bridojn kaj kriis: ”Ptruu!” al Läikkä, kiu ne volis halti. Finfine Eikka tamen trankviligis kaj haltigis la ĉevalon. Poste li ĵetis iom da fojno antaŭ la ĉevalon. Eikka mem iris al la neĝulo kaj kompreneble tuj rimarkis, ke ĝi estis kava, ĉar ni ne ekkomprenis kovri la enirtruon.

– Ho! Eikka furioze kriis kaj piedbatis la ventron de la neĝulo, tiel ke ĝi kolapsis. Li plu piedbatadis iom da tempo, ke restis nur neĝamaso. Tiam Eikka forĵetis la fojnon de antaŭ la ĉevalo kaj eksaltis en la sledon. Li turnis la sledon kaj batis la dorson de Läikkä per la kondukrimeno tiel ke ĝi krakis. Läikkä ektrotis reen direkte al la vilaĝo.

Kiam Eikka kaj Läikkä estis malaperintaj, ni grimpis demalantaŭ neĝremparo al la vojo. Komence ni iom da tempo silentis, ĉar ni sentis la okazon tiel strange.

– Li ja estis furioza, diris Repa finfine. – Bonŝance neniu tiam estis ene!

– Jes, mi ĝemis kun Jasu. – Li ja preskaŭ mortigis nin. Sed tiam ni ĉiuj ekridegis. Tiam Eikka ja ŝajnis tiom komika atakante la neĝulon. – La granda viro! diris Repa, kaj tiam ni denove ekridegis.

*El la libro 'Meidän talvi' tradukis
La grupo de Esperanta kurso
en La laborista instituto
de Lappeenranta*

Muut lehdet

Helsingin Sanomien Tripit-palstalla oli keskiviikkona 24.11. uutinen otsikolla ”Helsinki-kierros latinaksi ja yhdeksällä muulla kielellä”. Maaliskuussa kiertoajelujen kielivalikoima laajenee lehden mukaan. Helsinki Expert ottaa tuolloin käyttöön erikoisrakenne bussin, jossa on digitaalinen kuuntelujärjestelmä. Selostuskielen voi valita kymmenestä eri kielestä. ”Mirabilia urbis – Pää-

kaupungin ihmeet” on Helsinki-kierroksen opastus latinaksi. Helsingin Sanomat on haastatellut idean isää Risto Välttilää, joka totesi: ”Osa kuulijoista haluaa surffailla kieleltä toiselle ja koska latina on trendikäs ja alun perin Euroopan yhteinen kieli, se haluttiin mukaan”. Tilauskierrokselle saa Helsingin Sanomien uutisen mukaan halutesaan elävän oppaan.

Marjatta Rautio 1.5.1926–28.9.1999

Elli Marjatta Rautio forpasis 28.9.1999 post plurjara grava malsano. Ŝi naskiĝis en Helsinko, la gepatroj estis instruistoj. En la familio estis tri filoj kaj nur unu filino, ŝi, Marjatta. La fratoj ĉiuj studis kaj okupiĝis pri muziko kaj estas bone konataj en Finnlando: Paavo kiel orkestestro, Matti komponisto kaj Erkki kiel violonĉelisto kaj em. rektoro de Sibelius-akademio.



Marjatta okupiĝis pri lingvoj, i.a. pri la rusa kaj la franca, studinte ankaŭ eksterlande, en la universitato de Moskvo kaj ankaŭ en Francio. Iam dum sia vizito en Francio ŝi vizitis Gresillon-kastelon – eble laŭ rekomendo de sia patro, kiu estis aktiva esperantisto, UEA-fakdelegito pri ŝako en Helsinko. Marjatta iam rakontis, ke ŝi vere ne kredis pri utilo kaj signifo de artefarita lingvo, sed en Gresillon ŝi spertis la fenomenon Esperanto, lernis ĝin kaj poste ankaŭ multe instruis.

Kiam mi konatiĝis kun ŝi, ŝi estis rektoro en civilinstituto en Kuhmo, nordorienta komunumo en Savonio. Nuntempe la nomo Kuhmo estas fama en la muzika mondo pro la tieaj ĉiujaraj muzikaranĝoj. Marjatta vivis en Kuhmo ekde la 60-aj jaroj kaj apartenis al la fonditoj de muzika societo, kiu iniciatis la Ĉam-

bromuzikan festivalon en Kuhmo. Laŭdire tiam okazis debatetoj inter tiuj, kiuj proponis havigon de tornilo por manlaborado je ligno kaj la aliaj, kiuj preferis muzikinstrumento(j)n. La muzika partio venkis kaj la muzikaranĝoj en Kuhmo realiĝis, fariĝinte eĉ mondfamaj.

En la jaro 1975 nia landa asocio EAF havis Aŭtunajn tagojn en Kuhmo, kun ĉeesto de guberniestro kaj aliaj altranguloj. Kiel eksterlanda gasto estis UEA-prezidanto Humphrey Tonkin, elektita la antaŭan jaron dum la fama UK en Hamburgo. La Aŭtunaj tagoj -aranĝo estis vere impona – brila kaj elstara. Poste Marjatta Rautio estis kelkajn jarojn en la estraro de EAF, sed lasis tiun okupon, ”ĉar mi ja ne estas tre movadema”, ŝi mem opiniis.

Kiam la patro de Marjatta Rautio grave malsaniĝis fine de la 70-aj jaroj, ŝi lasis sian postenon en Kuhmo kaj revenis en Helsinko por prizorgi sian patron. En Helsinko Marjatta pasigis reston de sia vivo. Ni, kiuj konis Marjatta, memoras ŝin kiel vere humana homo, kiu neniam plendis, sed ĉiam pretis helpi aliajn kaj ĉiusence estis bonhumora kaj vere bona amiko.

Heta Kesälä

Korespondi deziras

